Cena 30 hal.

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ

s literární přílohou

„Legolibro de bohemaj Esperantistoj"

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de
CENTRA ASOCIO
BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.).

Prezid.: Jan Hradil. Sekr.: Karel Procházka. Kas.: F. K. Svačina.
Praha I., 342. Kavárna „Union".

B. U. E. sdružuje spolky esperantské v těchto místech:
B. U. E. unuigas sekvantajn esperantajn societojn:

PRAHA (klub)
PRAHA (Asocio, ligo)
PRAHA VIII.
PRAHA (akad. klubo)
PRAHA (stud. rondeto)
KRÁL. VINOHRADY
PLZEŇ (klub)
PLZEŇ (laborista klubo)
Č. BUDĚJOVICE
HRADEC KRÁLOVÉ
KUKLENY
PRASKAČKA
OSEK U ROKYCAN
PROSEK
MLADÁ BOLESLAV
TRUTNOV
MINICE
LIBEREC
PÍSEK
HOSTOMICE
JAROMĚŘ
PARDUBICE
KRALUPY
ČESKÝ BROD
KLATOVY
KARDAŠOVA ŘEČICE
NEBAHOV-PRACHATICE.

OBSAH — ENHAVO:

1909 **ÚNOR. — FEBRUARO.** III. 2.

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA

Časopis Českých Esperantistů

s literární přílohou

„Legolibro de Bohemaj Esperantistoj"

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září).

eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně 3 K pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, budiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Českých Esperantistů", Praha II.-2023, Dittrichova ul. 7. Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost.
Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (Fr. 3·75 = 1,50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata nur laŭ la adreso:

„Časopis Českých Esperantistů" en Praha II. (**Bohemujo - Aŭstrio**).
II.—2023. Dittrichova ul. 7.

La redakcio rezervas por si la rajton korekti la manuskriptojn por la preso; la nepresitaj manuskriptoj estos redonitaj, se oni almetis poŝtan markon. Originalaj artikoloj estos ĉiam pretere akceptitaj.

Účet poštovní spořitelny 93.281.

PARTO OFICIALA

enhavas artikolojn, avizojn k. t. p. de B. U. E., kies komitato redaktas ĉi tiun rubrikon. Demandojn kaj informojn adresu: „Bohema UNIO Esperantista“ (Al sekretario s-o K. Procházka) Praha I.—342. Esperanto-Kafejo „Union“ Ferdinandova tř. 29.

ÚSTŘEDNÍ SVAZ ČESKÝCH ESPERANTISTŮ

BOHEMA UNIO ESPERANTISTA

CENTRA ASOCIO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

B. U. E.

Ĝenerala kunveno de B. U. E. okazos dimanĉon, la 14. de marto; ĝia ĉefa punkto koncernos starigon de pli detala programo de

I. KONGRESO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ EN PRAHA.

Pro la graveco de tiu ĉi ĝenerala kunveno estas neeviteble bezone, ke ĉiuj unuigitaj societoj estu reprezentataj de siaj delegitoj Por kontentigi la scivolemon de nia esperantistaro, la komitato de B. U. E. anoncas provizoran skizon de la projektata manifestacio:

Laŭ ĝia opinio la plej konvena tempo estas Pentekosto (30., 31. V.).

Krom oficialaj kunvenoj kongresaj okazos propaganda parolado en Praha: estas rekomendinde aranĝi similajn paroladojn en ceteraj urboj, kie estas centroj esperantistaj.

Estos malfermita ekspozicio esperantista, okazos eksterordinara ĝenerala kunveno de B. U. E. kaj kunvenoj specialaj.

Inter la amuzajoj estu cititaj teatra prezentado, koncerto, ekskurso k. t. p.

Cetere la organiza komitato penos ĉiuforte, ke la kongreso estu plej alloga kaj plej sukcesa; estu certaj, karaj samideanoj, ke viaj belaj esperoj ne estos trompitaj!

Pro tio rapidigu jam de nun sendadon de aliĝoj, por ke povu esti plej frue fiksita la nombro de ĉeestontoj, ĉar sole por tiuj estos eble prizorgi la loĝejojn kaj komunan menuon, kiuj aliĝos antaŭ la 1-a de majo.

Prezo de la kongresa legitimacio estos laŭ ebleco malalta: sekve por kovri ĉiujn elspezojn rekomendas la komitato fondi specialan kason, kiu akceptus la mondonacojn.

Fine oni petas, ke niaj samideanoj sendadu al komitato temojn pri kiuj ili intencas paroladi, por ke riĉa kaj interesa programo povu esti plej baldaŭ fiksita.

Propagando kaj preso. Eliris kvina eldono de konata propaganda flugfolio po 2 hel. (Ĉe opaj mendoj 25% rabato, afr.) — Propagandaj kovertoj kun bohema teksto pri Esperanto, ĝia deveno kaj disvastiĝo; prezo 1 hel. (50 ekz. 40 hel. afr.). — Sekretario parolis en Litomyšl; la komitato organizis kurson por studentoj de altaj lernejoj en Praha (vidu pĝ. 29). — Direktoro de urba komerca lernejo „Dvoutřídní obchodní škola Nového Obchodního Gremia" en Praha s-o Trmal akceptis favore proponon de B. U. E. enkonduki regulan instruadon pri Esperanto en la nomita instituto. Kursoj kondukotaj de s-o K. Procházka komenciĝos post libertempo. — Unua bohema kongreso esp. estis anoncita per notoj senditaj la lastan monaton al naciaj gazetoj, el kiuj multaj ĝin aludis. — Laŭ iniciato de B. U. E. eldonis centra gimnastika societo „Česká Obec Sokolská" ilustritan informan cirkuleron (la tekston vidu sur pĝ. 4. de Č. Č. E.), da kiu mil ekzempleroj estis dissenditaj al ĉeĥaj konsuloj kaj delegitoj de U. E. A. kaj societoj esperantistaj. Per la sama informilo estis malfermita enketo pri gimnastikaj aferoj ĉe ceteraj nacioj. — B. U. E. redaktas bibliografian katalogon esperantan eldonatan monate de firmo F. Topič en Praha (Aldono al katalogo de franca literaturo).

Ekzamenoj. Unua termino en tiu ĉi jaro estas fiksita je Pasko. Precizan tagon kaj detalajojn oni anoncos en ĵurnaloj kaj laŭ deziro per specialaj leteroj.

Publika legejo de esperantaj gazetoj. Ni atentigas ĉiujn samideanojn de Praha kaj de ceteraj lokoj, ke ili ne forgesu viziti kaj rekomendi al siaj konatoj tiun ĉi unuan publikan legejon en Esperanto-Kafejo Union (Praha I. 342. Ferdinandova tř. 29), kie estas elmontrataj sekvantaj ĵurnaloj:

Lingvo Internacia, La Bela Mondo, Voĉo de Kuracistoj, Esperanto, Espero Katolika, Le Monde Esperantiste, The British Esperantist, Germana Esperantisto, Franca Esperantista, Časopis Českých Esperantistů, Frateco, Notizie Esperantiste, Rumana Esperantisto, Rumana Esperanto-Gazeto, Sarta Stelo, Holanda Pioniro, Greklingva Esperantano, Filipina Esperantisto kaj Japana Esperantisto.

Valná hromada svazu B. U. E. bude se konati počátkem března; hlavním bodem pořadu bude stanovení podrobnějšího programu I. KONGRESU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ V PRAZE.

Vzhledem k důležitosti této valné schůze jest nevyhnutelně třeba, aby všechny sdružené spolky byly zastoupeny svými zástupci.

Výbor Unie považuje svátky svatodušní za nejvhodnější dobu k pořádání kongresu. Projektuje krom oficielních schůzí propagační přednášku v Praze a doporučuje uspořádati podobné přednášky i v ostatních městech, kde jsou střediska Esperantistů. Na programu kongresu bude mimo jiné výstava esperantská, mimořádná valná hromada B. U. E., odborové schůze, výlety, divadelní představení, koncert atd. Výbor organisační vynasnaží se všemožně, aby tato první manifestace českých Esperantistů setkala se s nejlepším úspěchem. Aby mohl býti stanoven již počet účastníků sjezdu (jimž výbor je ochoten obstarati ubytování i společné obědy), žádáme všechny své přátele, aby zaslali přihlášky před 1. květnem t. r. Cena legitimace bude stanovena pokud možno nejnižší; proto však doporučuje výbor založiti zvláštní fond dobrovolných příspěvků.

Konečně žádá výbor řečníky o zasílání themat, aby co nejdříve mohl býti sestaven bohatý a zajímavý program.

PARTO NEOFICIALA.

SAME KIEL LA HOMOJ.

Sur herba bordo de gaje murmuretanta kaj plaŭdanta rivereto staris junkro — poplo. Li staris jam kelke da jaroj ĉi tie sola kaj izola, ĝojante nur de belaj ludoj de ondoj riveretaj.

Ofte, ho, tre ofte li deturnadis sian kronon laŭ la fluo, kie malproksime staris aro da liaj parencoj, tiel bele dismetitaj, ke ĝojpleniga estis rigardo je ili.

Tiuj certe ne malĝojas tie. Oni vidas kiel senĉese klinas la kapon jen unu al alia, jen ĉiuj kune, jen kelkaj interparoletas, jen aliaj kvazaŭ pro gajega humoraĵo kurbfleksiĝas, kaj tie — ne, ne estas eble disputi kaj koleri: ili certe nur ŝercas. Kaj la junkro sola, sola. Sen ĝojo, sen feliĉo . . . Kaj ne multe postulas lia feliĉo. Nenion plu, krom kunulo, kiu partoprenus kun li lian sorton, kun kiu li konsoliĝus, ĝojus, sopirus kaj funebrus.

Nur amikon, kun kiu li povus mano en mano balanciĝi en vento, kontraŭstari la furiozan uraganon kaj fulmotondron: kun kiu li vivus vivon plezuroplenon.

Sed jene? Sola kaj sola . . .

Kiel ofte li volis jam malesperi! Kiel ofte li decidiĝis, ke li ne plu kontraŭstarados la venton, ĝi rompu lian junulan korpon, ke li ne klinos la nukon antaŭ la tondro, ĝi frakasu lian zorgolaci-

ĝitan kapon, ke li ne fordirektos la radikojn de la fluo, la ondoj ilin subfosu kaj mortigu.

Sed li ne malesperis. Foje li rimarkis antaŭ si, sur la herbejo infanojn de kreitajo, kuraĝinta sin nomi fiere lia estro, estro de tuta naturo, li vidis kiel gaje ili saltetas, ludas kaj kantas, kaj li eksentis kun ili tian vivĝojon, ke por longa tempo li forgesis pri sia izoleco . . .

Tamen post kelka tempo ĝi reaperis kaj pli forte ankoraŭ. Mi dubas, mi dubas, junkreto, ĉu ci eltenos kaj ne malesperos.

Dum li tiel melankolie la kapon klinas, jen li rimarkas stari proksime — virgulineton. Tiel malgrandan, gracian virgulineton.

Ĝi estis ulneto.

Kvazaŭ novan vivon ŝi alportadus al popleto. Li konstante al ŝi kliniĝadis, ĉiam ŝin rigardadis, observante, kiel ŝi kreskas kaj fortiĝas, li ŝirmis ŝin antaŭ akcidentoj kaj malfeliĉoj — li edukadis el ŝi sian kunulinon kaj amatinon. Nur kiam ŝi elkreskos ankoraŭ iom, ke ŝi mem eksentu la amon! Kaj tiel pasis unu jaro kaj la dua kaj kiam la trian forportis la rivereto en maron, fariĝis la ulneto virgulino kiel anĝelo.

La popleto sentis vivan emocion, kiam ŝi demetis la vintran veston kaj sin vestis per somera robo.

Ho, kiom da ĝojoj!

Dum la tuta somero ili amis sin delikate, ĉirkaŭprenadis kaj kisadis sin, ĉe vespera ventbloveto dolĉajn amvortojn ili murmuretis al si, en rivereta nivelo ili sin rigardadis kvazaŭ en spegulo. Ili ĝojis pro tio kiel ĉio konvenas al ili, kun feliĉa rideto ili observadis la infanludojn sur la herbejo, ili ridis la petolemon de knaboj kaj atentege aŭskultadis kantojn de knabinetoj kaj vespere interĝuis feliĉon de du amsopirantoj, kiuj ĝis tien ĉi alvenadis, por ke neniu ĝenu ilian amon.

Alvenis aŭtuno.

Popleto kaj ulneto demetis la someran veston kal la unua zorgo trafis la junkron. Kiel ĝi estos plue? Ĉu lia amata ne mortos pro frosto. Li mem jam eltenis ion kaj eltenos ankoraŭ, sed ŝi, estajo delikata, malforta.

La kompatema vintro helpis lin en embarasoj. Ĝi prizorgis por ambaŭ robon molan, blankan, ke plezuro estis, ilin rigardi. Kaj refoje ili p̂remis sin unu al alia, varmigis sin kaj ĝojis pri alveno de printempo. Malrapide pasadis la malgajaj vintraj tagoj, sentinaj estis la duonlumaj noktoj.

Jen, fine, unu tagon grupo da birdoj de malproksime aperis, pli kaj pli distingiĝis, proksimiĝis kaj — eksidis en kroneto de ulneto kaj ĥore eksonis la fanfaroj. Ĝi estis paĝioj de reĝino Printempo.

Kaj responde al ili eksonis malproksime fortaj akordoj de sonoriloj.

Renaskiĝo . . .

De alia flanko terura grakado de nigraj birdoj, malbelaj, ke la ulneto ektimegis kaj tuta ektremiĝis. Ĝi estis servistoj de forpelita reĝino Morto, kiuj aperigadis siajn furiozojn.

Renaskiĝo, renaskiĝo!

Sorĉo de naturo. La amantoj eĉ ne rimarkis pli frue ke ĉe iliaj piedoj lekanto tapiŝon formas, ke la bordoj de rivereto estas ornamitaj per flavo de kalto kaj delikata kreso kaj ke fine leontodo paradas sur la herbejo.

Ĝojega, ĝojega, nova vivo. Unu matenon nova apero! Aliflanke de ulneto nova junkro ekkreskas, refoje popleto. Nia maljuna eksentis kordoloron, kiam la ulneto sciigis al li tiun ĉi novajon.

Ekrigardinte tien li vidis, ke vere balanciĝas tie juna, bela popleto. Ĉu tio estas ilia infano? Ne kaj ne! Neeble! Ĉu frato de ulneto aŭ alia parenco? Kaj tiu kreskis kvazaŭ el akvo. La maljuna poplo malĝoje vidis, ke la ulneto tiel ofte al la alia sin deturnas, lin karesas kaj ŝercas kun li. Sed li silentis. La ulneto ĉiam realkliniĝis al li, refoje ili amis sin kiel pli frue, sed al popleto tamen ne ŝajnis plu la ĉirkaŭpreno tiel varma, kiel siatempe. Dume pasadis la tempo, kiel akvo en la rivereto. El malgranda popleto elkreskis potenca poplo.

Jam antaŭ vesperiĝo, kiam la maljuna poplo atentis pri proksimiĝanta uragano. li vidis ke grupo da parencoj, poploj tie pli malsupre, skuas la kapon kontraŭ li, ridas, kaj montras je li. Li returnis la rigardon kaj . . . La ulneto ĉirkaŭprenas la junan. Ho, malfideleco!

La maljuna koleregis kaj deziris, ke Dio punu ilin dum la uragano, sed tiu ĉi pasis kaj ambaŭ perfiduloj, sendifektaj, sanaj kaj — feliĉaj. Tion vidinte, la poplo eksploris, sed neniu helpis lin nek la kolero nek la larmoj.

La ulneto kun la juna amis sin malgraŭ lia kolero, lia petego, lia ploro, furiozado kaj venĝopetado. Kaj kiam li iutempe je lasta fojo volis admoni la ulnon, ŝi ridis, elridis lin kaj mem insultis „kadukulo“ kaj diris, ke li estas tro aĝa por amo.

Tion li ne atendis: Pli frue bona kaj nun tro aĝa kadukulo. Li ne admonis plu, nek ploris, nek furiozis. Li silentis kaj silentis. Dume li malrapide nudigadis siajn radikojn, por ke la akvo povu ilin atakadi kaj unu matenon post venta nokto ŝaŭmis jam ondoj super lia renversita korpo.

Originale verkita de Frant. Jenne.

Originale verkita de Josef Hofmann:

LA KISO.

Kiso estas infano de poezio. Ĝi estas multekolora papilieto, suĉanta el kaliketo de rozaj lipoj dolĉan sukon, delikata florpolvo inspirita per suno de l' amo sur virgajn lipojn, ĝi estas ambrozio, kiun donas trinki dioj olimpaj al du teraj animoj. La kiso estas steleto, kiun anĝelo de amo post la mondkreo forŝtelis el ĉielo kaj alportis al geamantoj, kiam li ne povis plu rigardi tion, kiel ili pro sopiro je nekonata feliĉo pereas. Amo sen kisoj estas ĉielo sen steloj.

La kiso estas perlo, kiun geamantoj sur siaj lipoj serĉas, ĝi estas silenta preĝo de du koroj kaj ĵura signo de fidela amo. Ĝi estas simbolo de vivo, sen kisoj estus la vivo kiel morto, la mondo kiel dezerto.

Koncerne filozofian vidpunkton estas la kiso unuiĝo de idealismo kun materialismo, unuiĝo de agreblo kun belo. La kiso kreas supron de elsonĝita feliĉeco kunigante per helpo de lipoj la sentojn de du sin amantaj koroj. Ĝi estas muta esprimo de koro kaj elokventa pruvo de amo. La kiso kreas harmonion de du animoj, kvankam ĝi estas nur momenta kontentigo de malsatigita sopiro je volupto. En gramatiko de l' amo ĝi estas „epithéton ornans" kaj geamantoj nomas ĝin ĉielŝlosilo, tial eble, ĉar ĝi fermas la buŝon. La kiso estas frukto de arbo de bono kaj malbono, ĉar geamantoj fermas dum kisado siajn okulojn, tre bone sciante, ke ili pekas. Plene reprezentas la kiso bildon de vaneco.

Je vidpunkto de fiziko oni povas ĝin enmeti en fakon de elektro produktata per kontakto, ĉar la kiso sekvas teoremon, ke du diversspecaj elektroj reciproke sin altiras kaj tuj ree forpelas. Tial knaboj ŝatas plej multe kisi knabinojn. Kiel renkontiĝo de du diversspecaj elektroj estas akompanata de krakado, tiel ankaŭ duobla altiriĝo de lipoj estas sekvata, ekzemple en trankvilaj someraj vesperoj, de laŭte aŭdebla ŝmaco. Sed tre ofte okazas, ke la geamantoj sin kisas trans horizonto sen ĉiu ŝmacado kaj tiun malbruan egaliĝon de animelektroj oni nomas „ĉirkaŭprenado", en naturfiziko oni diras „fulmado". En somero troviĝas en aero plej multe da elektro, ĉe la geamantoj plej multe da kisoj. Kiso ekfajriĝas, elektra fajrero ekbruligas: tiu ĉi havas acidan guston, sed la alia dolĉan. Ke lipoj apartenas en vicon de bonaj kondukiloj de elektro, tion scias plej bone la geamantoj. Elektro kaj kiso estis konataj jam antaŭ Kristo.

La kiso estas vicigata en fakon de supera matematiko, ĉar la geamantoj kalkulas kisojn nur po centoj kaj miloj, kiel tion multaj naciaj kantoj atestas. Geamantoj multobligas pli volonte kisojn ol dividas, adicias ol subtrahas, sed plej avide ili kombinas

progresajn vicojn aritmetikajn kaj estas tro feliĉaj, se al ili dum kalkulado rezultas nombro senfina. Kiso estas matematika versimileco, kiu post multaj malsukcesaj provoj povas finiĝi per atingota edzeco. Je geometria vidpunkto estas la kiso tangento kondukita al rando de lipoj, kies direkton scias la geamantoj tro bone mezuri. Ĉe geamantoj „par distance" oni nomas tion linio neatingebla. Monon kaj kisojn oni pruntas je persona kredito kaj pagas poste kun rentumo, sed tiudiference, ke oni donas la monon antaŭ atestantoj. la kisojn nur „inter kvar okuloj." Per mono kaj ankaŭ per la kisoj oni povas procentegi.

Rilate muzikon estas la kiso la ĉefa, fundamenta akordo de ĉiu amo, ĉar ĝi parolas el koro en koron kaj estas kiel la muziko — internacia. Geamantoj komponas el kisoj tutajn muzikajn propoziciojn, kiuj havas grandan riĉecon je varioj, komenciĝas kutime „andante" kaj finiĝas „con amore furiozo". Iliaj komponaĵoj estas ĉiuj en „moll" kaj malofte ni trovas iajn paŭzojn. Antaŭ publiko prenas geamantoj „pianissimo", se ili estas solaj „fortissimo". Je fino de neniu komponaĵo devas manki rimarko: „repetatur". La kisaj melodioj estas tute nur lirikaj.

Jan Neruda:

JONO IDIOTO.

Idiota Jono estis kvazaŭ kreita por plezuro de petolema junularo. Li estis eble dekokjara, sed li havis mienon de dektrijara infano. Kiam li ŝteliris hejmen de butikistino aŭ de negocisto, kien lia patrino lin sendadis, — pluen li neniam kuraĝis iri — ĉirkaŭsaltetis lin la buboj kaj kriadis „Jono! frenezulo! Jono!" Li, kvazaŭ ne atentante tion, malrapide marŝis pluen, respirante penplene kaj profunde, kaj ofte li eĉ ŝanceliĝis, kvazaŭ la maldikaj kruroj eĉ ne povus porti tiun malfortan korpon. Kiam ili baris al li la vojon kaj komencis lin puŝadi, lia senmova, vaksa vizaĝo turniĝis al ili, kaj timema demando vidiĝis en lia okulo. Dum momento li staris tiel mute kaj senmove, poste li ektremis, kvazaŭ tuŝita de la morto kaj penis foriri dekstren aŭ maldekstren. „Jono jonas," ili kriadis en sia buba slango, rimarkante lian ektremon. Li neniam sin defendis.

Veninte hejmen li fordonis tion, kion li alportis, kaj sidiĝis silente apud la kameno.

„Venu al mi, Johanĉjo; prenu seĝeton kaj sidiĝu apude," admonis lin lia fratino, je unu jaro pli aĝa, gracia, blondhara knabino, kaj formetis la kudrajon.

Li malrapide ĝistrenis la seĝeton al ŝiaj piedoj. Ŝi metis lian malsanetan kapon sur siajn genuojn. Li ploregis, ĝis lia koro

ekĉesis bati: ŝi karesis kaj konsolis lin venkante siajn proprajn larmojn.

„Ĉu ne vere, mi ne estas frenezulo!“ fine li paroletis maltrankvile. Lia malforta voĉo tremis.

„Kompreneble, ke ci ne estas! Ci tamen estas prudenta. Johaneto, lasu ilin paroli.“

„Kaj ci min amas, kaj mi estas neniu frenezulo!“ kaj sur la vango de la idioto etendiĝis feliĉega rideto.

„Nun prenu violonon kaj ludu.“

„Sed mi ne volas nun denove aŭskulti lian filudadon! Li ludu vespere sur la tegmento, se li volas,“ murmuris kutime la patrino. Jono restis silente sidi kaj rigardis nur sian fratinon, observante atente eĉ ŝian plej malgrandan ekmovon.

Liaj patrino kaj frato ne amis lin, li do havis nur sian fratinon, kiun li ankaŭ amis per la tuta forto de sia malforta spirito. Sed en la najbararo oni rakontis pri li, ke la idiota Jono posedas dian donacon, kiel li ludas violonon, oni diris, tiel ludas neniu, kaj tamen li neniam havis instruiston. Nur ke li neniam ludas „pecojn“, ke lia ludo estas same strange malĝoja, same frenezula kiel li mem.

Jono loĝis en la sama domo, kie mi travivis miajn infanjarojn. Li konis min kaj klinadis ridetante la kapon ĉe nia renkontiĝo. Mi povas diri, ke malgraŭ tiama knaba petolemo mi neniam faris al Jono eĉ plej malgrandan malbonon. Lia vaksa vizaĝo ŝajnis al mi iel sankteca. Juneca fantazio rimarkis neneigeblan similecon kun la malvive vaksaj, flavetaj kaj travideblaj vizaĝoj, kiujn mi vidadis en la kestoj sur preĝejaltaroj.

Estis sabato. Malfrua vespero ĉion vualis per ravaj vestoj. Ĉielo blua kaj malhela kiel lazuro, tie ĉi kaj tie travidiĝis arĝentaj steloj kiel pensoj de feliĉegulo, kaj inter ili naĝis granda, hela luno, disverŝante sian brilon sur akvoj kaj arbarmontoj, orumante malaltan dometon kaj preĝejojn fiere alten leviĝantajn.

La tumulto, ordinara en la domoj dum dimanĉaj antaŭvesperoj, iom post iom silentiĝis. La virinoj, kiuj antaŭe vivigis la korton, kaj post la laboro interparolis dum kelka tempo sur la ŝtuparoj kaj balkonoj, estis jam hejmen foririntaj.

Nur sur unu balkoneto de tria etaĝo sidis ankoraŭ du junaj homoj, knabino kaj juna viro, en grava interparolado. Ĝi estis gefianĉoj, la venontan tagon jam ili estis edziĝontaj. Fianĉino estis la bela Marinjo, fratino de idiota Jono, fianĉo juna, sed laŭ famo tre lerta maŝinisto el iu fabriko de Smíchov. Li nun estis ricevonta pli profitigan lokon en iu kampara fabriko kaj oni do rapidigis la edziĝfeston.

Ili sidis jam longe tie ĉi. Ĝis kiam la bruo regis en la domo, la gefianĉoj nur paroletis, kvazaŭ ili timus la eksteran mondon kaj volus limiĝi nur je si mem; nun, kiam ĉio silentiĝis, ili parolis pli laŭte, kvazaŭ ili volus, ke trankvila, majesta nokto estu atestanto de iliaj feliĉego, promesoj kaj planoj. Certe ĝi estas feliĉego ekscitiganta, kiun sentas feliĉaj geamantoj en la antaŭtago de sia eterna kunligo.

Nur unu homo esprimis proksime de la geamantoj siajn sentojn pli laŭte ol ili mem, sed li ne ĝenis ilin. Sed la sentoj, kiujn li esprimadis, ne estis tiom orbrilaj, tiel helaj, ĝi estis nur elegiaj ekĝemoj, kortuŝantaj tonoj, kuniĝantaj en malgaja, fantazia kanto. Tiun kanton kantis idiota Jono, alie muta, sed en tonoj elokventa. Kompreneble ĝin ne kantis lia malforta brusto, li havis alian parolon por esprimi siajn sentojn kaj oni facile ilin komprenis, kiam liaj palaj fingroj pli aŭ malpli forte premis vibrantan kordon, kiam lia arĉo eligis jen daŭrajn, potencajn, jen malforte finsonantajn tonojn. La idiota Jono posedis dian donacon!

En la interparoladon de la geamantoj sonis malgaja kanto de Jono kaj ne ĝenis ilin. Ili estis okupitaj per si mem kaj jam kutimintaj je lia malgaja ludo, — oni fine kutimiĝas al ĉio, eĉ al ĝemado de mortantoj pro malsato.

Jono'n mem ili ne vidis, ĉar li ludis alte super ili.

La domo, en kiu ni loĝis, estis antikva, malbele konstruita. Ĝi havis selforman tegmenton, kiu limiĝis kontraŭ strato kaj korto per duobla fronto. En la defluilon inter ambaŭ enrampis Jono, kiu ne devis ludi en la ĉambro, ĉiam dum bela vetero kun sia violono kaj tie li sidis ankaŭ hodiaŭ.

Li sidis tie jam de la momento, kiam alvenis la fianĉo de lia fratino, kaj li ludis kvazaŭ ne konante laciĝon, senfine longan kanton, ĉiam la saman koncerne elegian bazon, sed tamen ĉiam malsaman en esprimo. Certe liaj ludoj ne estis artaj komponaĵoj.

Subite meze de tono nefinigita, li ĉesis, kvazaŭ la kordoj ne volus soni. La manoj kun violono falis, nur lia seka vizaĝo, ĉiam rigardanta lunon, restis senmova, kvazaŭ ŝtoniĝinta. Li longatempe tie sidis, fine li malrapide komencis stariĝi. Atente li formetis la violonon kaj la arĉon kaj marŝis senbrue, kvazaŭ timante propran paŝon, al rando de la tegmento. Tie ĉi li klinis sin super la defluilo kaj ekrigardis la interparolantojn.

Malpeza nubeto transflugis la lunon.

Malsupre oni jus duonlaŭte parolis pri li.

„Sed hodiaŭ ŝajnas al mi, ke Johanĉjo estas neordinare malgaja! Ĉu li ne estas pli malsana?" demandas la maŝinisto.

Jono movetas la kapon.

„Li ĉiam estas malgaja, kompatindulo, sed precipe de kelkaj tagoj," respondas Marinjo. „Li senĉese demandas min, ĉu mi vere lin forlasos. Ni kunprenos lin, ĉu ne vere?"

„Tuj de komenco tio ne estas ebla, pli malfrue eble vi povos veturi por li."

Marinjo lin ĉirkaŭprenis.

Jono malrapide reŝoviĝis, rektigis sin kaj marŝis atente kiel antaŭe al sia loko. Tie ĉi li refoje sidiĝis, apogis per mano la vizaĝon kaj rigardis en la lunon. Sur liaj vangoj fluis grandaj larmoj, li ne ploris. Liaj lipoj malrapide malfermiĝis kaj li paroletis intermite: „Mi t on sciis, ke ŝi ne amas min tiom, kiel lin, kaj ŝi ne amas!"

Tiel li sidis longe, tre longe, kaj unu larmo sekvis alian. Ŝajnis, ke lia kolo kuntiriĝas de doloro, li deprenis de ĝi la tukon, per kiu li viŝis siajn vangojn.

Fine li subite stariĝis kaj malaperis en la malfermaĵo de la tegmento. Violonon kaj arĉon li lasis sur la tegmento.

*

Jono tre ofte dormis dum tuta nokto en la subtegmento, kaj oni do serĉis lin nur la sekvantan tagon, kiam Marinjo jam komencis vesti sin. Oni trovis lin en la subtegmento pendigitan per propra tuko.

La edziĝfesto de Marinjo okazis je kelke da monatoj pli malfrue.

Trad. Voĉo.

Z CELÉHO SVĚTA.

V. světový kongres Esperantistů. Obě národní korporace esperantské zastupující jazyk španělský a katalánský zaměstnány jsou přípravnými pracemi. V organisačním výboru zasedají: Frederic Pajulà Vallès, předseda; Alfonso Sabadell, místopředseda; Miquel Cases, pokladník, a pí. Germaine Rebours, jednatelka. Odbor propagační: Dr. J. Bremon Masgrau; ubytovací: R. Claramunt; slavnostní: Sales Balmes; „floraj ludoj": Carlo Bourlet a Vila Roca. Cena legitimace stanovena na 10 K. Legitimace číslo 1. bude vyhražena pro toho, kdo nabídne za ni nejvyšší cenu. Městská rada vydá kromě esperantského průvodce po městě několik tisíc plakátů, které budou rozeslány do všech větších měst evropských: věnovala již k účelům propagačním 2000 peset. Po prohlášení, že Barcelona zvolena za sídlo kongresu, vzrostl tak zájem o Esperanto, že vyučuje se tou dobou ve 46 kursech, které jsou četně navštěvovány obyvatelstvem všech tříd a zaměstnání. Stejně jako v Cambridge a v Drážďanech i zde jest pořádán kurs pro městskou policii, jíž opět připadne úloha průvodčích cizinců.

Esperanto a vzduchoplavba. Nový týdenník francouzský L'Aéro uveřejňuje v každém čísle zprávy esperantské; redaktor tohoto časopisu Ernest Archdeacon jest nadšeným přítelem Esperanta a snaží se applikovati je všestranně ve službách aeronautiky. Koncem loňského roku uspořádal hromadnou výpravu pěti set Esperantistů na první výstavu vzduchoplaveckou v Grand Palais v Paříži. Vysvětlivky, jakož i nástin rozvoje aviatiky byly účastníkům podávány pouze esperantsky.

O doktorské dissertaci o Esperantu, kterou měl v Paříži Pierre Corret, referovaly přední listy francouzské: Le Journal, Le Petit Parisien, L' Auto, L'Aéro, Le Courrier du Centre atd. — Předseda francouzské společnosti esp. prof. Th. Cart byl zvolen **předsedou pařížského lingvistického spolku** „ne *ačkoliv*, ale *protože* jest Esperantistou.“ — **Světové závody pařížské** vydávají cenníky v Esperantu a korespondují esperantsky: A la Samaritaine, Au Bon Marché, Grands Magasins du Louvre, Grand Bazar de la Rue de Rennes. — Pařížský **policejní klub** čítá již 50 členů. — **Subvenci** 100 fr. věnovala městská rada v Le Puy místnímu spolku esp. — V londýnské škole **Nothern Polytechnic** súčastnilo se přes 1000 osob zábavy pořádané předními londýnskými Esperantisty. — Největší cestovní kancelář **Th. Cook & Son,** která koresponduje též Esperantem, vydala turistickou příručku redigovanou francouzky, německy, italsky a esperantsky. — Saský ústav esp. v Drážďanech, vydal právě **zprávu o čtvrtém kongresu,** obsahující v 19 kapitolách podrobná pojednání o jeho průběhu, seznam 102 spolků esp. v Německu a řeč poslance dr. Zöphela, proslovenou ve prospěch Esperanta v saské sněmovně. Zpráva jest ozdobena 33 obrazy. — Spolek Esperantistů v **Moskvě** uspořádal propagační zábavu, při níž sehráno mimo jiné též druhé jednání „**Revisora**“ (překl. Dr. L. Zamenhof). Na 450 osob bylo přítomno této slavnostní schůzi. Studentský klub založen posluchači **moskevské university** (130 členů). — Lékařský ruský časopis „**Chirurgie**“ uveřejňuje výtahy z původních článků esperantsky. — **K. K. K. I.** V Londýně byl ustaven mezinárodní esp. klub, jehož členové dopisujíce si Esperantem, vzájemně své dopisy opravují. Příspěvek ročně K 1·20. Podrobnosti sdělí M. W. Stokes Hall, London, W. 17. St. Stephen's Square, Esperanto House. — U. E. A. připravuje **stručné průvodce** „Gvidfolioj“ po všech větších městech světa, které bude možno sestavovati ve zvláštní knihy, podobně jako okružní cestovní lístky. Tak bude na př. obsahovati příručka pro turistu, který chce cestou z Varšavy do Barcelony navštíviti hlavnější města, popisy Lodže, Vratislavi, Kr. Hradce, Prahy, Plzně, Mnichova, Bernu, Ženevy, Lyonu, Grenoblu, Marseille a Barcelony. Popis Prahy obstaral za přispění Českého zemského svazu pro povznesení návštěvy cizinců ústřední svaz Bohema Unio Esperantista. — **Víděň-**

ský spolek „Fideleco“ upozornil na význam Esperanta policejního ředitele, který doporučil zvláštním oběžníkem všem úředníkům učiti se tomuto jazyku. Esperanto-Informejo založena ve Vídni IV. 2. Alleegasse 58. Čítárna časopisů esp. zřízena v kavárně „Währingerhof“ (Vídeň XVIII.). — Mezinárodní **lékařský svaz** esp. založil studentskou sekci. Informace udílí jednatel R. Badert, Tours, 35. rue Michelet. France. — **Český klub** esperantský v **Baltimore** přistoupil za člena Severoamerického Svazu. — V Kanadě a ve Spojených Státech jest založeno již 126 spolků a vychází šest esp. časopisů. Druhý národní **kongres americký** bude pořádán od 9. do 14. srpna t. r. v Chautauqua. Adresa výboru: 1038 Jackson Blod. Chicago, Ill. — Průmyslová a zemědělská **výstava v Częstochově** v Polsku bude obsahovati též sekci esperantskou. — V **Rumunsku** horlivě propaguje Esperanto mezi slepci královna Carmen Silva: kursy jsou pořádány na gymnasiu, v městské škole, pro Řeky, Němce, Italy atd. — Státní cestovní kancelář **na Novém Zelandu** vydává jízdní řády a informační tiskopisy v Esperantu. — Na valné hromadě lékařského spolku **v Mexiku,** jíž súčastnil se též ministr vyučování, přednášel „o významu Esperanta pro lékařství“ dr. Vargas. — Kol. Pollen přednášel v Londýně „o propagaci Esperanta **v Arabii**“. — V Douai a v Angers (Francie) otevřeny kursy pro vojsko; na vídeňské exportní akademii vyučuje se Esperantu ve třech kursech. — **Spolek německých Esperantistů** byl založen v Praze pod názvem „Esperanto-Verein Verda Stelo Prag“. Předsedou zvolen prof. dr. Lederer, jednatelem Jul. Boschan. — Poslední dobou založeny spolky esp. v **Jerusalemě,** v **Chartumu** (Egypt) a na **Samu.**

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

Výbor **Svazu Českých Esperantistů** *s potěšením oznamuje, že bylo vyhověno žádosti podané slav. sboru profesorskému české vys. školy technické v Praze za propůjčení místností ku konání přednášek o Esperantu.* Výbor ligy usnesl se, aby poplatek za kurs 2 K (pro stud. 1 K.) byl věnován ve prospěch podpůrných institucí studentských. Zahajovací přednáška koná se v sobotu dne 6. března t. r. Vyučovati se bude dle původní učebnice Esperanta: „Methoda Kühnlova.“

Do **knihovny** zakoupeny:

č. 16. Grimm-Kabe: *Elektitaj Fabeloj* (199 str.);
č. 17. A. Grabowski: *Kondukanto kaj Antologio* (183 str.);
č. 18. J. Bach Sisley-Touchebeuf: *Rakontoj al mia belulino* (134 str.)
č. 19. *Laŭroj*, premiitaj verkoj de „La Revuo“ (138 str.);
č. 20. Bernardin de St. Pierre-Hodler: *Paŭlo kaj Virginio* (113 str.).

Pan inž. J. Pařízek navrhuje, aby knihy objednávaly se z knihovny (Praha II. Dittrichova ul. 7.) dvojitým korespondenčním lístkem. Druhý, nepopsaný lístek, bude zaslán knihovníkem onomu členovi, který má dotyčné knihy právě vypůjčeny; nebudou se tudíž knihy vraceti zpět do Prahy. Výbor doufá, že členové vyhoví vždy v čase nejkratším, aby nebylo příčiny ku

stížnostem. — Valná hromada Svazu bude se konati o svátcích svatodušních u příležitosti I. kongresu českých Esperantistů v Praze. Inž. Č. Šalamon předs., inž. Jar. Špergl inž. Fr. Kühnl jednatel.

Esperantista Klubo en Praha malfermis publikajn kursojn por komercistoj (marde) kaj sinjorinoj (ĵaŭde) vespere 8—9 en kafejo „Union". Regulaj membraj ikunvenoj kun konversacia kurso okazas merkrede „u Donátů". La 27. de februaro estis ĝenerala kunveno. Laŭ iniciato de kelkaj membroj estis fondita en Praha la unua bohema societo esperantista „Zamenhof": ĝiaj membroj devas ĉiam kaj ĉie interparoli sole esperante. Se ili pekis kontraŭ tiu ĉi ĉefa regulo, ili devas pagi por ĉiu bohema aŭ neesperanta vorto unu heleron (estas rekomendate aĉeti kuponaron po 10, 20 kaj pli multaj „pekpardoniloj"; ĉe unua okazo ĉiu devas ĝin aĉeti). Oni povas fari escepton, se fremda persono ĉeestas, kiu, nesciante Esperanton, povus senti sin ofendita, ĉar ĝi ne komprenus. Tiam sufiĉas kovri la signon (verdan rubandon) ĉe eniro. Kun personoj ne aliĝintaj, oni povas paroli boheme. La membroj pagas neniun kotizaĵon; kunvenoj okazas merkrede kaj dimanĉe en societa sidejo „kafejo Union". Prezidanto fariĝas ĉiam tiu, kiu „pekis" plej ofte. Karaj samideanoj sekvu nian ekzemplon, por ke ni havu baldaŭ en Bohemujo multe da bonaj, perfekte parolantaj Esperantistoj! La unua bohema kongreso rapide proksimiĝas. Laboru diligente! — En januaro estis definitive fondita „Akademia Esperanto-Klubo" por studentoj de bohemaj altaj lernejoj; la klubo aranĝas kurson helpatan de B. U. E. en sciencaj institutoj de bohema universitato (dimanĉon 9—10) Karlovo nám. 26. Gvidanto de kursoj kaj ĉefa iniciatinto de tiu ĉi klubo s-o M. U. St. Ligi Lustig sendos al ĉiu interesiĝanto pli detalajn sciigojn (Praha II. Kateřinská ul. 15). Tuj post sia fondiĝo aliĝis la klubo al centra asocio B. U. E. — Antaŭ unu jaro fondita „Studenta Rondeto Esperantista en Praha" atingis en lasta tempo mirindan sumon da 75 membroj danke la kurson aranĝatan ĉiudimanĉe de 10. ĝis 11. horo en kafejo „Union" kaj gvidatan de s-o F. Štěpánek. Preskaŭ 40 membroj partoprenas la kunvenojn kaj oni povas esti kontenta je ĝis nun atingita rezultato. S. R. E. starigas nuntempe en ĉiuj bohemaj urboj oficojn de delegitoj-studentoj kies tasko estas propagandi Esperanton inter studentaro en urbo de ili loĝata. Pli detalajn sciigojn pri la delegita fako donos s-o K. Kuthan, Praha II. Ječná ul. 24. — Esperantista klubo en Praha VIII. malfermos je komenco de marto novan kurson por komencantoj, al kiu ĝi invitis per specialaj cirkuleroj ĉiujn lokajn societojn. — Esp. sekcio de societo „Sdružení mladých lidí" en antaŭurbo Král. Vinohrady (Brandlova ul. 43) aliĝis al B. U. E.

Esperantista Klubo en Plzeň. Nova komitato elektita ĉe lasta ĝenerala kunveno (1. II.) konsistas el sekvantaj membroj: s-o J. Schwarz prezid., s-o F. Šrámek vicprezid., s-o J. Pohl sekr., s-o F. Hofmann protokolisto, f-ino A. Jindrova kasistino, f-ino E. Lehnertova bibl., s-o A. Tytl revuisto, s-o V. Lukeš, arhivisto. La klubo eldonis tre bele presitan regularon. Konversacian kunvenon en restoracio „u Kuštejnů" vizititan de 26 membroj, partoprenis kiel gasto unu samideano el Köln a. R. Tiuj ĉi kunvenoj okazas ĉiusabate. Kurso malfermita la 12. I. estas diligente vizitata de 35 lernantoj. — Laborista klubo „Zamenhof" en Plzeň elektis sekvantan komitaton: s-on V. Hojer prezid.,

s-on V. Šilpoch vicprez., s-on A. Hošek sekr., s-on J. Silhánek protok.. s-on V. Pech kas., s-on K. Sedláček bibl. Nova adreso: Restoracio de K. Sedláček, Plzeň, Barandova ul. 14. La biblioteko enhavas jam 35 librojn. — Hradec Králové. La 10. de jan. paroladis pri Esperanto sekretario de B. U. E. s-o K. Procházka. La 13-an komenciĝis en komerca akademio kurso vizitata de 30 lernantoj. Oni instruas dufoje en semajno. Regulaj kunvenoj de membraro okazas unufoje en semajno. Al Esperanto-Oficejo kaj al individuaj Esperantistoj venas oftaj demandoj koncerne la ekzamenojn kaj la lingvon ĝenerale. — Prosek. Ĝenerala kunveno elektis la 31. de januaro sekvantan komitaton: s-o J. Kneifl prezid.. s-o A. Němeček vicprezid. s-o V. Čánský sekr., s-o P. A. Müller bibl., s-o V. Heyduk kas. Kurso malfermiĝos printempe. — En ĝenerala kunveno de Esperantista Klubo en Kukleny (27. I.) estis elektitaj prezid. s-o J. Jelínek, sekr. s-o J. Jebavý. bibl. s-o F. Macháček, kas. s-o V. Kocourek. La klubo havas jam 57 membrojn. La kursoj okazas dimanĉe de 2—3 horo. Post la ĝenerala kunveno estis aranĝita „amuza vespero". Programo: s-o Bradáč (violono), f-ino Součkova (kanto), tercetto f-inoj Chmelařova, Soubova, Flečkova (kanto), f-ino Rakova (fortepiano), s-o P. V. Gyurkovicz (aldo-violono), s-o Hamerský (violonĉelo); ĉe fortepiano s-oj instruisto J. Pochyba kaj lernejestro Prokop. — Esperantista Klubo en Mladá Boleslav sendis al ni belan fotografajon de siaj membroj. Bedaŭrinde pro manko de loko kaj pro teknikaj malhelpaĵoj ni ne povas reprodukti tiun ĉi bildon. Ni tamen esperas, ke ĉiu povos baldaŭ ricevi de siaj korespondantoj el Mladá Boleslav presotajn ilustritajn poŝtkartojn kun tiu ĉi grupo de samideanoj. La kurso daŭros ĝis 31. de marto. — Prezidanto de Esperantista Klubo en Trutnov s-o J. Šilhart parolis antaŭ 50 personoj en Lhota Šárová la 31-an de januaro. Partoprenis ankaŭ ses membroj el Trutnov. Laŭ deziro de aŭskultintoj vizitados s-o Šilhart ĉiumonate la junan centron esperantistan por tie instruadi pri nia lingvo. — En Hostomice pod Brdy elektis niaj samideanoj efikan propagandilon: Per bele aranĝita invita karto (boh. kaj esp.) ili anoncis la unuan esperantan balon, kiu okazis la 24. de januaro en hotelo „Štědrý". Duono de neta profito estis dediĉita por naciaj celoj. — Český Brod: Kurso kondukata de s-o V. Pechatý komenciĝis la 16. de februaro en restoracio „u Orla". — En Praskačka paroladis la 18. de februaro pri Esperanto kaj la kvara kongreso sinjoro Jos. Jeřábek. La interesan paroladon aŭskultis multe da partoprenintoj al kiuj montris la oratoro riĉan kongresan dokumentaron. De nun enhavos la distrikta gazeto „Hlasy Venkova" ĉiusemajnan kronikon pri Esperanto, redaktatan de s-o Jeřábek. Junaj lernantoj de lia kurso (11—14 jaroj) vigle korespondas kun francaj amikoj el Lille. La ĉiutage ricevataj komunikaĵoj entuziasmigas ilin kaj incitas ilian fervoron. — Laŭ ĵus aprobita regularo fondiĝis societo esperantista en Nebahov (Prachatice) kun sekvanta komitato: s-o J. Železný prezid.. s-o P. Železný sekr., s-o J. Soukup kas. La societo tuj aliĝis al centra asocio B. U. E. — En Lomnice nad Popelkou oni baldaŭ definitive fondos klubon: la iniciatintoj rilatas jam pli longan tempon kun B. U. E. — Bohema Unio Esperantista estis petita organizi kurson esp. en Kolín. Aliĝojn akceptas s-o J. Stěpán, poŝta aspiranto. La klubo havanta 25 membrojn anoncis jam sian baldaŭan aliĝon al B. U. E. Unua kunveno okazis la 2. de febr.: estis elektitaj s-o F. Hlavá-

ĉek prezid., s-o B. Kubíček sekr., s-o J. Štěpán kasisto. La 15. de nov. 1908 estis malfermita en komerca lernejo kurso por 30 lernantoj, protektata de s-o prof. Tvrdek. Instruas s-o Boh. Kubíček. — Komercista societo Č. O. B. en Mnichovo Hradiště aranĝis kurson por siaj membroj; instruas s-o Pavlišta, faka instruisto. — La 28. de jan. aranĝis en Litomyšl virina societo „Spolek paní a dívek" kaj societo „Beseda" paroladon en „Domo de Smetana" laŭ iniciato de s-o P. Karel Kučera, parohestro en Mikuleč, kiu klarigis al multenombra ĉeestantaro signifon de Esperanto. Pri la IV. kongreso en Dresden kaj pri U. E. A. parolis s-o Procházka sekretario de B. U. E. Oni devas danki precipe s-inon Klem. Laubová, s-ojn Dr. Fr. Lašek kaj Dr. B. Velc, kiuj subtenis la efektivigon de tiu ĉi sukcesa vespero. Najbaran centron esperantistan en Vysoké Mýto reprezentis s-oj ekskolonelo Formánek kaj ĉefleŭtenanto Laufberger. Vekiĝis granda intereso; la 3-an de febr. ĉeestis unuan lecionon de kurso gvidata de s-o Ant. Metyš 130 personoj (inter ili 74 studentoj). En aprilo kaj majo okazos kursoj elementa kaj supera. Nun estas instruate en du kursoj paralelaj. — Kurso direktata de f-ino M. Melicharova komenciĝis en Nový Hradec Králové. — En Břevnov apud Praha okazas kurso en gastejo „u Trnobranských", ĉiumerkrede kaj ĉiuvendrede 8—9 h. vespere. La kurso estis malfermita la 17. de februaro. — En Strašín apud Sušice estas kurso de s-o Luigi Henych, instruisto. — S-o Fr. Fučík, faka instruisto el Bernardice apud Tábor paroladis pri Esperanto la 4. de februaro ĉe instruista distrikta kunveno en Milevsko. — Filio de „Landa Unuiĝo de privataj oficistoj en reĝolando Bohemujo" en Ústí nad Orlicí decidiĝis la 16. de jan. aranĝi esp. kurson, en kiu instruas s-o Aug. Čermák, librotenisto. — En Tábor paroladis en societo de agronomiaj akademianoj s-o Br. Hellwig pri Esperanto. Ĉion koncerne la klubon, kiu estis fondita post la parolado la 1-an de marto, adresu al s-o R. Ez. Cikhart, subdelegito de U. E. A. — La 7. de febr. fondiĝis klubo en Prostějov (Moravio); prezid. estis elektita s-o Rudolf Fridrich. — En Hodolany apud Olomouc instruas de komenco de februaro s-o R. Horák, poŝta kontroloro. — En Olomouc, kie la 3-an de febr. paroladis s-o Votruba, lernejestro el Těšetice, montriĝas ankaŭ intereso pri Esperanto; sekve baldaŭ kurso komenciĝos. — Esper. Societo en Vsetín ĵus fermis la unuan kurson en kies lastaj lecionoj oni instruis ankaŭ konversacion. Regulaj kunvenoj okazados ĉiun vendredon en legejo de societo „Snaha". Baldaŭ estos aranĝata kurso por lernantoj de unuagradaj lernejoj. — En Vieno lernas Esperanton bohemaj studentoj de alta agronomia lernejo malfermintaj propran kurson. En XV. distrikto instruas pri Esperanto s-o K. Macháček, ĉefa poŝta kontroloro, en kunvenoj de bohema societo „Tovačovský".

BIBLIOGRAFIO.

Hachette & Cie, Paris, Bd. St. Germain 79: *La Sentencoj de Salomono*. Libro el la Biblio. El la originalo tradukis Dr. L. L. Zamenhof (59 pĝ. 15 × 20). Prezo Fr. 1·50. La verko enhavas preskaŭ mil facilajn frazojn (en 31 ĉapitroj), kiuj


povas pro sia klareco kaj korekta stilo esti plej bone rekomendataj kiel legaĵo en elementaj kursoj. — M. Becker, E. Grosjean-Maupin: *Cours Elémentaire Pratique d'Esperanto* d' après la méthode directe combinée (164 pĝ. 11 × 17). Prezo 1 Fr. — Camille Aymonier, E. Grosjean-Maupin: *Cours méthodique d' Esperanto.* Thèmes (132 pĝ. 11 × 17.). Prezo Fr. 1·20. — Camille Aymonier, E. Grosjean Maupin: *Cours méthodique d' Esperanto.* Versions (133 pĝ. 11 × 17). Prezo Fr. 1·20. La tri libroj, plej zorge verkitaj estas tre valora riĉigo de nia literaturo. Kvankam niaj francaj samideanoj posedas jam pli multe ol dudek lernolibroj, tamen, ni estas certaj, oni plezure legos tiujn ĉi plej novan, kiuj prezentas neelĉerpeblan fonton da ekzemploj, frazoj kaj temoj. Tre laŭdinda estas devizo laŭ kiu ĉiuj aŭtoroj laboris pri sia verko: Pli mallonga estas la vojo per ekzemploj ol per reguloj. Vere, por kursestroj fariĝos la libroj neeviteble bezonaj.

Presa Esperantista Societo, Paris, 33 r. Lacepède. Dr. Pierre Corret: *Utilité et possibilité de l' adoption d' une langue internationale auxiliaire en médecine* (142 pĝ. 16 × 25). Franca teksto de doktora tezo, pri kiu ni parolis jam en lasta numero de Ĉ. Ĉ. E.: ĝi ricevis mencion „tre bone" kaj estis laŭte aprobita de la juĝintoj. La aŭtoron helpis per siaj valoraj konsiloj eminentuloj el tuta mondo, al kiuj li turnis sin petante ilian opinion pri la utileco kaj ebleco de lingvo internacia aplikota en medicino. Li kolektis en sia libro ĉiujn gravajn dokumentojn, kiuj faras lian verkon ne sole instrua sed ankaŭ interesa.

Studento, esperanta organo de studentoj - Esperantistoj komencos eliradi post libertempo 1909. Montra ekzemplero estos sendota al ĉiu, kiu ĝin mendos pagante 20 hel. (unu int. resp.-kuponon). Ĉiujn sendaĵojn koncerne la gazeton adresu: s-oj K. Kuthan, Vl. Tobek Praha I. 342. Esperanto-Kafejo „Union". Kunlaborantoj bonvenantaj!

KORESPONDANTOJ. *16. S-o Evgenij Vojnovskij. *Zarajsk* Razanskoj gub. Rusujo (dez. kor. kaj interŝanĝi il. k. kaj p. m.). — *17. S-o Arvo Ahti. lice ano *Abo* (Turku). Arseninkatu 5. Finnlando (il. k. poŝtm.). *18. S-o Elias Costa, Sabadell, *Barcelona,* Arrabal de Dintre 40. Hispanujo. — *19. S-o Tisseyre, *Paris,* rue du Temple 64 (il. k.). — *20. S-o A. F. Korrek, 630 S. 14. St. *Siganaw,* Mich. U. S. A. (il. k. ĉiam tuj respondos). — *21. S-o Paulin Masse, *Belleville-sur-Bar,* Ardennes, France (il. k. ĉiam tuj resp.) — *22. S-o Karl Harald, Sarén, *Åbo,* Martinkatu 3. Finnlando (dez. kor. pri io ajn). — *23. S-o John R. Rasmusson. Saa Länggatan 12. *Landskrona,* Svedujo (dez. interŝanĝi p. k. kun bohemaj gesamideanoj).

Rimarko: *4. S-o Lud. R. Pissarro, Paris, ne respondas je vidaĵkartoj; vidu lian anoncon.



PROPAGAČNÍ OBÁLKY

s českým textem o vzniku a rozvoji Esperanta vydané ústředním svazem B. U. E. v Praze.

Cena 50 ex. . . . 40 hal. vypl.
Praha I. 342.

PROPAGAČNÍ LISTY

obsahující na 4 str. nástin významu, mluvnice a rozvoje Esperanta, jsou nejlepší pomůckou informační při přednáškách atd.

Cena 2 hal. (Při hromadných objednávkách 25% slevy.)
Red. Č. Č. E. Praha II. 2023.

NEJLEPŠÍ PROPAGAČNÍ POMŮCKOU
jest

KLÍČ ESPERANTA,

obsahující úplnou mluvnici a slovník. Cena 5 hal. Větší vydání 10 hal. (Slevy pro spolky.)
Red. „Časopisu Českých Esperantistů“.

Ĉiuj Esperantistoj devas regule legi

„ESPERANTO“.

Duonmonata Internacia Gazeto.
La plej ofta! La plej legata! La plej malkara!
Tutmonda informilo. — Ĉiulandaj korespondantoj.
Vivado nacia. Politiko. Komerco kaj industrio. Juro. Arto kaj literaturo. Felietono. Internaciaj enketoj.
Oficiala organo de

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

Esperanto aperas en jurnala formato la 1an kaj 15an de ĉiu monato.
Unu numero: 15 ctm (6 Sd). — Jara abono 4 Fr. (Sm 1·60).
Direkcio: 8, rue Bovy-Lysberg, Genève (Svisujo).
Specimeno senpaga laŭ peto.

KURS ESPERANTA

zahájen bude v sobotu dne 6. března t. r.
na
C. K. ČESKÉ VYSOKÉ ŠKOLE TECHNICKÉ V PRAZE
(Karlovo náměstí).
Příspěvek na celý kurs 2 K (studující 1 K). Čistý výtěžek bude věnován nadaci Skuherského.
Vyučováno bude v úterý a v sobotu od 6½—7½ hod. dle methodické učebnice Kühnlovy.

Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de K. Pitter, Praha.